



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 45/1975 - 21 dec 1975
Aperas ĉiusemajne

=====

NIAJ BARDOJ en Bonn

Bonn (pp) - La 5-an de januaro 1976 okazos en Evangelische Studentengemeinde, Bonn, Königsstrasse 88, granda salono, koncerto de "Niaj Bardoj".

La grupo premieris per propraj komponaĵoj pri versaĵoj de Julio Baghy pasintan someron dum seminario en Inowrocław. La menciita koncerto okazos lige kun turneo, kiu komenciĝos en Cuxhaven ĉe la Internacia Seminario de GEJ.

La programo konsistas el po 50 minutoj da propraj komponaĵoj pri versaĵoj de Baghy kaj da pola folkloro. La enirprezo estas 3,-- GM. Programkajero kun ĉiuj tekstoj en originala Esperanta kaj pola lingvoj kun germana traduko estas antaŭvidita!

Invititaj estas ĉiuj esperantistoj el la regiono Köln-Bonn kaj pli fora ĉirkaŭaĵo. Kompreneble ankaŭ ne-esperantistoj estas bonvenaj!

UEA enketas

Varsovio/Rotterdam (pp) - La estrarano de UEA pri informado kaj turismo, St. Swistak, dissendis al Landaj Asocioj, Fakaj Organizaĵoj, Landaj Sekcioj de TEJO enketilon, kies tasko estas kolekti la plej ĵusan materialon pri informa agado. La enketilo helpos entrepreni analizon de la nuna stato de informado en la Esperanto-movado. La analizo estos prezentita al la Estraro de UEA dum la januara kunsido.

Nova donaco al la fondaĵo Azio-Afriko

Romo (pp) - Post la brilaj ekzemploj de la germana kaj de la brita Landaj Asocioj Svisa Esperanto-Societo decidis donaci 300 svisajn frankojn al la fondaĵoj Azio-Afriko de UEA. Krome la svisa societo disponigos preseblecojn por presi ekzemple informilon destinitan al afrikaj landoj kaj nun tradukata al afrikaj lingvoj.

PILO - PRESS

deziras

agrablajn

festotagojn!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pidel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69



*Kiam la popoloj povos libere
sin kompreni, tiam ili estos
recepte sin malami.*

Humenloj

Ankaŭ dum 1975 regis malamo. Ni esperu ke dum 1976 estu malpli da malamo!

=====

Pri informado kaj instruado

Dadrigo de raportoj kaj spertoj de agantoj en FRG

Manfred Führer, D-6236 Eschborn 1: Dum jaroj mi ne sukcesis kunigi sufiĉe da personoj por kurso. Tiu stato ne kontentigis min, do mi cerbumis pri ebla solvo. Jen mi trovis! Ĝi tamen ne estas mirakla solvo, sed baziĝas sur amaso da pena laboro, ne nur de mi, sed de tuta teamo. Mi prelegis inter septembro 1974 kaj januaro 1975 en 11 societoj, entute al proksimume 400 personoj. Krome okazis individua varbado fare de mi kaj de kelkaj aliaj gesamideanoj.

La rezulto de tiu peno estas: Fine de januaro 1975 ni povis starti la unuan kurs-semajnfino kun 5 komencantoj kaj 2 progresintoj. En marto kaj komence de novembro servis du pliaj kurssemajnfinoj, kvara okazos fine de novembro. Ĝis nun neniu el la komencantoj forlasis la aferon; en ĉiu semajnfino aldoniĝis novaj. Lastan fojon ni bezonis tri kursgvidantojn; por la venonta semajnfino eĉ estos kvar: Florin Caragea, Frankfurt/M; Roberto Kvasnak, Offenbach; Franz Kruse, Rossdorf kaj mi. La gekursanoj loĝas, manĝas kaj lernas en la sama domo kune, kaj tiel kreiĝas io kvazaŭ grupa sento. Alia avantaĝo: la gekursanoj ne facile povas eskapi antaŭ ol ili lernis certagrade la lingvon, kaj tio ŝajne sufiĉas por decidigi ilin veni ankaŭ la sekvantan fojon.

Resume: La decidaj kriterioj laŭ mi estas 1) ampleksa, celita, trafa informlaboro en la tuta avizita distrikto; 2) anstataŭ vesperaj kursoj, al kiuj venas neniu aŭ eble unu persono, okazu semajnfina kurso, kiu kunigas la gekursanojn ne nur de unu loko, sed de tuta distrikto; 3) La nombro de kursgvidantoj konformu al la bezono; la laborgrupoj ne estu tro grandaj, maksimume 5-6 personoj; 4) La gekursanoj vivu kune sub unu tegmento dum la tuta kurso.

Noto de Pilo-Press: Manfred Führer estas fakreferento por Esperanto de la Asocio de Naturamikoj; liaj spertoj baziĝas je la laboro en la naturamika medio!

Günter Conrad, München: La intereso en la publiko ne estas granda. En la urba biblioteko estas 3-4 lernolibroj por Esperanto de Wingen kaj Kieseritzky; al la lasta mi aldonis sonbend-kaseton por la intereso, kiu emas studi la parolmanieron. Mi kontrolas la uzon de la lerniloj. Okaze de la ekspozicio en aŭgusto 1975 mi pendigis kelkajn afiŝojn, a) en la regiono, b) en la urba biblioteko. Tie pendis ankaŭ tiu de UEA (nigra fono, du kapoj) eĉ en la enirejo - meze de aliaj afiŝoj - sed la skribo "esperanto" estas ne legebla en la distanco de 2-3 metroj, tial la afiŝo estas tute senvalora! Ni devas mem presigi novan afiŝon, pli bone legeblan - vidu miajn proponojn en la manlibro. La Wingen-libroj staras kvazaŭ kaŝe sur la librobretoj. Granda malavantaĝo: Sur la dorso ne estas skribita bone legebla la vorto "Esperanto", ĉar ili estas tre maldikaj. Ĉar la publiko povas mem elekti el la librobreto, ili neniam vidas niajn librojn. Nur personoj, kiuj venas kun la celo, elekti Esperanto-libron en la kataloga kartaro aŭ demandas la oficistinojn. Sed tio verŝajne tre malofte okazas.

La homoj ne emas forlasi la hejmojn vespere. Ili preferas rigardi la televidon. Tial ni devas iri en iliajn hejmojn. Ni akcelu la memstudadon, do ni aranĝu korespondajn kursojn. Nepre ni enkonduku diskojn, aŭ pli bone magnetofonajn kasetojn instruante tiel la parolmanieron. Krome ni vendu sonbendkasetojn kun informoj pri Esperanto en germana lingvo, enhavante erojn el esperantlingvaj radio-elsendoj,

prelegoj de famaj profesoroj kaj intervjuojn en radio aŭ televido. Dum la tuta jaro okazas ĉi tie en Munkeno internaciaj ekspozicioj kaj foiroj. Tie ni disponigu 6-lingvaj UEA-faldfoliojn. Ĉie, kie okazas turismaj kaj sciencaj kunvenoj, ni faru la samon. En Eŭropa Esperanto-Revuo donu impulsojn sur la verba kampo. Ni kontaktu kun parencaj kaj kulturaj organizoj, ni vizitu ties kunvenojn kaj en deca kaj ne altruda maniero akcentu en la ĝusta momento la neceson de internacia lingvo.

Joh. Windisch, 7440 Nürtingen: Esperanto ŝajnas al la plej multaj homoj ne reala afero kaj same stranga kiel kondukas multaj esperantistoj! Ni proponu kaj ebligu al interesuloj vojaĝojn kaj ferio-restadojn en Esperantistoj-rondoj. Per artikoloj kaj anoncoj mi varbis por la entreprenoj de Hungara Esperanto-Asocio. Al la Vintraj Esperanto-Perioj en Budapeŝto mi gvidos grupon de 7 membroj. Tio estas tro humila, eĉ malesperiga produkto de miaj klopodoj. Certe ankaŭ sekvo de manko de spertoj, malsufiĉa informado kaj malbona varbado.

Venontan jaron mi volas provi tion ankoraŭfoje. Al la Naturamikoj, ĉe kiuj mi estas fakreferento por Esperanto, mi volas proponi vojaĝon al Ĉeĥoslovakio kaj Hungario kun partopreno je ferio-restadoj organizotaj de tieaj Esperantistoj. En la rondo de la Naturamikoj mi intencas organizi kelkajn prelegojn dum la venonta jaro.

Bertil Englund, Svedio: En la plej lastaj numeroj de Pilo-Press kelkaj esperantistoj raportas tre pesimisme pri la efiko (malefiko) de sia varbado por Esperanto-kursoj. Mi ne estas aktivulo, sed tamen, mi rajtas meditati aŭ filozofii pri la afero: Mi estas konvinkita ke oni ankaŭ kun modestaj rimedoj povas almenaŭ atentigi pri la ekzistado aŭ la rolo de Esperanto. Mi ofte miris kial ekz. la multaj Esperanto-kluboĵoj de la mondo ne abonas por siaj lokaj ĉefbibliotekoj la seriozegan revuon pri la monda lingvoproblemo. Certe legus multaj lingvistoj tian revuon, kaj eĉ la biblioteko mem eble transprenus la jar-abonon. Kial la Esperanto-kluboĵoj ne mendas ĉiujn aktuale eldonitajn turistbroŝurojn? Ĉiu landa Esperanto-Asocio donacu al sia ĉef-radio-diskoteko ekz. la diskojn de Ramona van Dahlisen. E-kluboĵoj povas fotokopiigi multekzemplere la tabelon de radio-elsendoj en Esperanto, disdonante ilin al la komencantoj....

Tion kion mi priskribis kompreneble ne rilatas al Esperanto-kursoj, sed rilate al la kreskigo de la renomo (prestigo) de nia mondlingvo estas gravege ankaŭ kunmeti diversajn unuopajn ideojn aŭ agojn, mal-longe sub la rubriko aŭ sub la demando: "Kiel kreskigi la prestiĝon de Esperanto, kiel krei por Esperanto pli bonajn kondiĉojn?"

Unu klara fakto: la motivacio al lernado de fremdlingvo ĉe la plej multaj homoj estas la t.n. util-faktoro, t.e. la plej multaj demandas: Kian utilon mi havas de tiu aŭ tiu lingvo. Tro longtempe en multaj Esperanto-rondoj certa tipo de homoj fakte ridindigis la rolon de nia mondlingvo.....

S-ro Bertil Englund momente profesie estas en la bavara loko Hof, kie li ludas en orkestro. De la 22a ĝis la 29a de decembro li restados en Varsovio!

Pilo-Press ĉiusemajna sendependa informservo eldonita de Ludwig Pickel, D-8500 Nürnberg 1, Postfach 2113. Jara abono 30,-- GM; kun germana eldono 40,-- GM. Pagoj al Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851 aŭ al Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579

La venonta numero de Pilo-Press aperos la 2-an de januaro 1976

Aŭkorad tempo entun por partopreni la Konferenco de Pola Radio!

Esperanto en radio

CIUTAGE

Varsovio

6.00—6.30 horo 41 m (7270 kHz);
49 m (6135 kHz);
75 m (3955 kHz);
200 m (1502 kHz)
16.00—16.55 horo 31 m (9675 kHz);
41 m (9540 kHz);
41 m (7145 kHz)
22.30—23.00 horo 49 m (6135 kHz);
75 m (3955 kHz);
200 m (1502 kHz)

Novajoj, komentarioj, felietonoj, Esperanto-Ekspresso, Trarigado de la Esperanto-gazetaro, Koncerto kun bondeziroj k. a. Programfolio senpage!

DIMANĈE

Vieno

6.45—6.55 horo 48,74 m; 41,38 m
Komentarioj, radiaj artikoloj, leterkesto
ORF, Esperanto-Redakcio, P. O. Box 700, A-1041 Wien, Aŭstrio

Sofio

9.30—10.00 horo 31 m
21.05—21.30 horo 49 m

Sciigoj el Bulgario, popola muziko Radio Sofio, Esperanto-Fako, Sofia, Bulgario

Ni povas esti prave fieraj pri la bonegaj sukcesoj de la **ESPERANTO-REDAKCIO DE LA AŬSTRIA RADIOFONIO!**

Jam plurfoje AER per koncizaj raportetoj prezentis la agadon de tiu ĉi AEF-komitato, kiu nun, kiam al la mezonda disaŭdigado aliĝis la ĉiusemajne dufoje prezentata de Esperanto-informoj per mallongondoj, kreskis je unu el la plej pozitivaj aktivajoj de nia nuntempa aŭstria Esperanto-movado. Grandegan kaj respondecan agadon plenumas niaj kunlaborantoj sur la radio-sektoro. Kvankam iliaj vortoj disradiiĝas tra la tuta mondo (dum du semajnoj jam estis nombrataj 31 elskriboj — la plej multaj inter ĉiuj fremdlingvaj disaŭdigoj de mallongondoj de Vieno), tamen ilia laborado okazas sen eĉ ŝajno de fanfarona distruptado. Krom la interesajoj kaj novaĵoj pri Aŭstrio la Esperanto-redakcio de ORF ne preterlasas okazajn por intervjuj ges-anojn, kiuj gastas inter ni.

Estas evidente, ke al laborado tia, kien ni per la supraĵo nur povis rando tuŝi, devas sekvi rekono de multaj flankoj. Estas la Internacia Inform servo „PILO-PRESS“, kiu oftege registras tiujn agadajn. Ĝi laŭdas ĝian aktualecon, ekz., en kazo de la morto de d-ro Karl Schleizer, ĉefo de la Aŭstria Popolpartio. En n-ro 26/75 PILO-PRESS sub „Esperanto en Radio“ skribis: „Vieno ... resume oni povas konstati, ke la nun funkcionantaj Esperanto-elsendoj prezentas vastan skolon da interesaj programoj kaj ke iliaj pozicioj ŝajnas esti firmigitaj. Tamen necesas pli granda subteno per abundo da korespondantoj fare de la aŭskultantoj!“

Romo

21.00—21.20 horo 41,15 m (7290 kHz);
41,24 m (7275 kHz);
49,92 m (6010 kHz)

Novajoj el Italujo, Kuriero de Esperanto, Leterkesto Radio Roma, Esperanto, C. P. 320, I-00100 Roma, Italio

LUNDE

Berno

13.20—13.30 horo 31,46 m; 46,66 m; 75,28 m
Felietonoj pri svisaj kaj Esperantaj temoj
Schweizerischer Kurzwellen-Dienst, Esperanto, CH-3000 Bern 16
Programfolio senpage!

MERKREDE

Berno

13.20—13.30 horo 31,46 m; 46,66 m; 75,28 m
Felietonoj pri Esperantaj temoj

JAŬDE

Berno

22.45—22.55 horo 31,46 m; 46,66 m; 75,28 m
Ripeto de la lunda elsendo!

VENDREDE

Zagrebo

00.05—00.20 horo 264 m
Novajoj el Jugoslavio, radiaj artikoloj, respondo al korespondantoj, preparo de ricevitaĵ periodaĵoj Radio Zagreb, Esperanto-Redakcio, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio

Pekino

21.00—21.30 horo 43 m; 33 m; 31 m
Informoj, raportoj el la ĉina kulturo, politiko, ekonomio
Radio Pekino, Esperanto-Redakcio, Pekino, Ĉinio

SABATE

Vieno

17.45—17.55 horo 48,74 m
Vidu la dimanĉan elsendon!

Pekino

21.00—21.30 horo 43 m; 33 m; 31 m
Vidu la vendran programon!

Berno

22.45—22.55 horo 31,46 m; 46,66 m; 75,28 m
Ripeto de la merkreda elsendo!
Aŭskultu regule la Esperanto-elsendojn kaj nepre skribu al la stacioj viajn kritikojn, konsentojn, proponojn. Petu programfoliojn en Esperanto!

Paske al Eindhoven!

Aliĝu nun al la **Europa Esperanto-Kongreso, Paskon 1976 en Eindhoven!** La kongresa kotizo estas ĝis la 31. 12. 76 20 DM/n. gld. Sendu vian aliĝilon al **Europa Esperanto-Kongreso, Magnolastr. 4, Eindhoven, NL, kaj vian pagon al la sama adreso kaj la nederlanda poŝtarkonto (poŝtarkonto Den Haag) N-ro 33797 66. Ankaŭ germanaj esperantistoj aliĝu ĉe la sama adreso!**

Apude ni publikigas ekstraktojn el artikolo pri la Vienaj Esperanto-Elsendoj el "Aŭstria Esperanto-Revuo" 75/10-12

Alvoko al la aŭskultantoj

Estus gesto de rekono se ĉiu aŭskultantoj de Esperanto-elsendoj ankoraŭ ĉi-jare skribus leteron aŭ poŝtkarton al la koncernaj Esperanto-redakcioj. La adresojn vidu supre!

Cetere, Radio Varsovio ricevis la 17a de decembro 4 777 korespondantojn. Do mankas nur 223 al la kosma nombro 5000! Kunhelpu transpaŝi tiun nombron kaj krei senprecedencan okazaĵon en Esperanto-radiofonio! Skribu tuj,

Kalendaroj el Gechingen por 1976

Ankaŭ ĉi-jare aperis la konataj kalendaroj el Gechingen: Kolora Florkalendaro kun tekstoj en Esperanto kaj germana kaj Bestokalendaro kun teksto en germana lingvo, sed ambaŭ kalendaroj surhavas la surskribon "Esperanto lingvo internacia". Prezoj: Florkalendaro 3,50 GM Bestokalendaro 5,50 GM + afranko! Mendu ĉe Ludwig Pickel, 35 Nürnberg 1, Postfach 2113.

++++++

Kristnaskan muzikon surhavas longdaŭra disko. Sur la disko Reinhard Hauptenthal rakontas la Kristnaskan historion en dialekto de Saarbrücken tradukitan el la bavara lingvo. Prezo 20 GM. Mendu ĉe Sarlanda Esperanto-Ligo 6602 Dudweiler, Franz-Schubert-Str. 26